

# ESPERANTA FINNLANDO

1960

N:o 1

## INFORMILO DE FINNLANDAJ ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ

**JARKOLEKTO 1960 — 9 numeroj**  
A b o n p r e z o enlanda 300 mk  
eksterlanda 450 mk  
aŭ 12 respondkuponoj

Bonvolu prefere aboni per la ĝirokonto  
8392 aŭ senpere en la poŝto.

Adreso de la administrejo (abonoj kaj  
anoncoj): Männikkötie 5 M 67,  
MAUNULA

Redakcio: Vilho Setälä, Kaarlo Jokinen, Emil Stenholm.

Redaktejo: Esperantotie 4, MATINKYLÄ (artikoloj, novaĵoj, recenzoj, interŝanĝo de gazetoj)

Ĉiuj esperanto-organizaĵoj, kluboj kaj societoj estas varme petataj konstante kontribui per novaĵoj kaj interesaj artikoloj, proponoj ktp., por ke nia gazeto estu vera komuna informilo.

## NOVA JARDEKO

En la komenco de la nova jardeko ni konstata, ke la antaŭa jardeko finiĝis per tre koncentrita aktiveco en la tuta esperantista mondo. La jubilea jaro, kiu ĉie manifestiĝis per festoj, ekspozicioj, publikaj gazetartikoloj kaj rezolucioj, formis valoran punkton al la fino de la 50:a jardeko.

Ankaŭ en nia lando la aktiveco estis ĝojige granda. La pli vastiĝinta atento akirita per apero de nova lernolibro, gazetinformado, jubileaj festoj estas okulvide konstatebla. Vizitoj de eksterlandaj samideanoj, kiel Björn Collinder, Tibor Sekelj, Eizō Ito, Ludwig Thalmaier, k.a. certe faris impreson al multaj »eksteraj» personoj.

Ne malpli atentidan ĉeneron en la tuto formas ankaŭ nia modesta organo. Kompare al ĝia antaŭulo en multobligita formo, ĝi aperis la unuan jaron en pli inda vesto post multaj jaroj. La legantaro kreskis de tri cent ĝis ĉ. 700 abonantoj.

Rilate al la enhavo de la organo oni povas havi diversajn opiniojn. Inter la plej elstaraj tiaj evidente apartenas la lingva demando. Multaj

ja ŝatus, ke Esperanta gazeto estu nur esperantlingva. Tamen tiu parto el la legantoj devis konstati preskaŭ malon. La aperon de la nacia lingvo defendas la fakto, ke ni devis elkreskigi pli grandan, pli fortan adeptaron, kaj por tiu prilabora agado tre bone funkciis EF ĝuste per siaj nacilingvaj artikoloj. Aperigo de la artikoloj kaj finne kaj esperante eble ŝajnis malŝparo de la spaco, sed ni povis konstati, ke tia dulingveco bone servis al multaj studentoj, kiuj komparante ambaŭ artikolojn unujn al la aliaj samtempe havis bonan studmaterialon en ili.

Komenciĝis la nova jardeko. Ni povas nun ĝoji pro la akiraĵoj. Novaj kluboj fondiĝis, en la kursoj frekventas pli grandaj grupoj. Intereso estas vekita. Estonta perspektivo aperas nun promesplena. Nun ni havas premisojn por pli vasta kaj fruktodona laboro. Sed antaŭ ĉio ni memoru, ke eĉ la plej bona grundo perdos sian fekundecon, se oni ne prizorgas ĝian bonfarton. Tial ni lasas al ĉiu konscia kunlaboranto admonon suprenteni la torĉon en sia agadtereno. En tiu

## Kalevala per Esperanto

La gazeto »Käkisalmelainen» intervjuis nian poeton Johan Edvard Leppäkoski pri la tradukado de Kalevala — jam en lasta februaro. Tamen, la plejparto de niaj samideanoj ne legis, kion la malmute disvastigata ĵurnalo presis, kaj la afero ankoraŭ estas aktuala. Niaj legantoj certe volonte aŭdos pri ĝi.

La intervjuato komencis:

— Laŭ mia memoro la laboro komenciĝis antaŭ 40 jaroj. Jam kiel 18-jara junulo mi eklernis esperanton, kaj baldaŭ mi komencis provadi tradukojn al ĝi, kaj mi rimarkis, ke »menso mia estas ema, cerbo mia certe pensas» (tio estas la komenco de Kalevala — noto por tiuj, kiuj ne konas ĝin). Kaj tiel la afero komenciĝis.

— Sed verŝajne vi tamen ne uzis la tutajn 40 jarojn por la tradukado?

— Certe ne. Parto de la unuaj slipoj verŝajne restis dum la »vintra milito» ie en Karelio, kaj dum la evakua tempo io perdiĝis, la resto malordiĝis. Simple: mi devis rekomenci la laboron. Dua milito ĝin interrompis . . .

— Kaj kia estis la traduklaboro?

— Malkaŝe dirite, ĝi estis same malfacila kiel la atingo de luno per atoma veturilo. Ĉiu finno ja konas Kalevala'n kaj kredas kompreni ĝin. Sed ju pli mi provis traduki, des pli mi komprenis, ke malantaŭ la vortoj

---

tasko Esperanta Finnlando volas esti je via servo. Esprimu al ni viajn zorgojn kaj dezirojn, ni helpos laŭ nia povo. Nia organo sekve estos grava kontaktilo en la landa movado. Tial ni rekomendas al vi aboni nian gazeton ankaŭ en la jaro 1960.

Ni deziras al vi feliĉan novan jaron kun la espero, ke via inspiro daŭre veku novajn adeptojn ĉirkaŭ la verda flago.

Kajo.

de niaj prapatroj estas io pli ol babilado: Kalevala estas la plej sagaca eposo en la mondo. Mi volis konatiĝi kun ĉio, kion oni verkis pri Kalevala — sed tio estas tro multe por unu homa vivo. Kelkajn milojn da paĝoj mi tamen trastudis — por fine kompreni, kian gigantan taskon mi prenis al mi. Tuisimple: kiam mi komencis traduki iun version, mi kvazaŭ humiliĝis antaŭ Dio por preĝi, ke mi kapablu kaj sukcesu.

— Kaj en kia grado vi kredas, ke vi kapablis kaj sukcesis?

— Malfacile estas al mi mem juĝi. Miaj malfacilaĵoj nome superis tiujn de ĉiu antaŭa tradukinto. Ni prenu ekzemplon. Profesoro Björn Collinder ja tradukis laste nian eposon sveden. La traduko estas bonega, certe la plej bona el la tradukoj de Kalevala, vera poezio — kelkfoje eble eĉ tro ornamita. Certe ĝi donas al svedoj la plej trafan bildon de ĉiuj valoroj de nia eposo. Sed la premiso por tiel bona traduko estis malnovaj svedaj vortoj, arkaismoj, kiujn Collinder utiligis kaj aldonis al la fino kiel »vortlisto». Kaj antaŭ ĉio, li devis dum la traduko pensi nur pri svedoj, ke ili komprenu ĉion. Kontraŭe, mi devas serĉi tradukan formon, kiun komprenu la esperantistoj de ĉiuj landoj — ĉar mi ja devas supozi kaj esperi, ke Kalevala estos legata en ĉiuj — pli ol 80 — landoj, kie esperantistoj ekzistas. Jam tiel simpla nacia »saŭna» rito kiel 'lyödä löylyä' (ni prove tradukas: ŝprucigi banvaponon — La Red.) ne estas sen plue komprenebla por brazilano. Ĝi devas esti tradukata al vera internacia lingvo, ne nur per esperantaj vortoj. Kaj aliaj, multe pli malfacilaj lokoj troviĝas en Kalevala, tiaj, pri kiuj la specialistoj-folkloristoj estas pretaj taŭzi la harojn unu de la alia.

— Ni ja estas speciale interesataj aŭdi, kiam la verko estos presreta.

— Sen sufiĉa bonvolo kaj favoro de aliuloj tio povas prokrastiĝi ĝis... nu, ĝis eterneco.

— Sed tia laboro ja devas ne resti malkompleta!

— Nu, mi ja ne lasos ĝin eĉ pro manko de sufiĉa sano. Sed se mi havus trankvilan labortempon, la rezulto eble estos pli delikata...

Tiel interparolis la intervjuanto kaj la tradukinto. Nun, kiam ni publikigas ĉi tion por la esperantistoj, restas nur la lasta polurado de kelkaj kantoj kaj — la mono por presigi kaj eldoni la verkon. Ni provis akiri ŝtatan subvencion kaj monon el diversaj aliaj publikaj fontoj. Ĝis nun kun malmulta rezulto. FONDUMO ESPERANTO faris sian eblon, kaj ĝia kontribuo estas ĝis nun la plej granda. Ni turnos nin al riĉuloj, sed nenion sciante pri la estonta rezulto ni nun volas nin turni al la esperantistaro.

### OFERTO PRI ANTAŬMENDO DE KALEVALA

**Kalevala** konsistas el 50 kantoj, el kiuj unu, la kvara, aperis en Norda Prismo somere 1958. Ĝi estas akceptita kun vera entuziasmo. Ni citu nur, kion profesoro Juan Régulo Pérez skribis pri ĝi:

»Unue mi volas vin plej varme danki pro la unuaranga kajero de 'Norda Prismo' dediĉita al via lando. Laŭ mia kompreno, ĝi multe superas (antaŭan numeron de N. P.). Ravis min ĉio, sed ĉefe la majstra traduko de la Kvara Kanto de Kalevala. Admirinde estas, kiel samideano Leppäkoski sciis redoni aliteracion kaj aliajn belaĵojn. Mi scias nenion pri la beloj de tiu poemo en la suoma lingvo, sed mi scias pozitive, ke la traduko de tiu kanto estas surprize bela, kaj same atestas la kapablon de la tradukinto kiel la kapablon de esperanto...»

La verko enhavos ĉ. 400 paĝojn, kun ĉ. 25000 duoblaj versoj, estos presita sur bona papero kaj bone bindita.

## Rauha ja yhteisymmärrys

### I

Joku aika sitten oli mielipidetutkimus kohdistettu siihen, uskovatko kansat rauhan säilymiseen vai pelätäänkö sodan pian puhkeavan uudelleen. Tuloksena mainittiin Suomen katsovan tulevaisuutta optimistisimmin.

Valoisa usko tulevaisuuteen on sinänsä rakentava tekijä, jos se purkautuu tarmokkaaseen työhön uskotun ja toivotun tuloksen saavuttamiseksi. Kunpa optimismimme vain ei merkitsisi tuudittautumista hyväuskoiseen toimeentuloon.

Ei ole ainakaan haitaksi pysähtyä miettimään rauhan säilymisen edellytyksiä, nimen omaan ajatellen omaa mahdollista osuuttamme niiden kehittämiseksi.

Sodan voimakkaimmaksi aseeksi on mainittu propaganda. Tämä on meille varsin mieluista todeta, koska se vapauttaa meidät tutkistelemaan vain

---

Por antaŭmendantoj ni nun proponas ĝin je la prezo de 1500 finnaj markoj aŭ 15 guldenoj nederlandaj, El tiu sumo minimume la triono devas atingi nin ĝis fino de majo, kaj la resto en unu aŭ du partopagoj antaŭ la fino de aŭgusto ĉi-jare. La antaŭmendantojn ni ne pagigos pro la sendkostoj. Eksterlandanoj pagu al nia konto ĉe UEA aŭ sendu al ni 38 respondkuponojn, se ili ne povas rekte pagi per banko al nia poŝtkonto n:o 10185, aŭ al nia ŝparkonto n:o 45905 ĉe la Nordlanda Ligobanko (Pohjoismaiden Yhdyspankki-Nordiska Föreningsbanken) en Helsinki.

Se ni ricevos subvencion por plimaltigi la prezon, ni kompensas la antaŭmendantojn. Sed se ni ne ricevos tian, la venda prezo estos pli alta — kiom, estas neeble diri ankoraŭ.

FONDUMO ESPERANTO-HELSINKI  
Poŝta adreso: Esperantotie 4,  
MATINKYLÄ.



rauhan säilymisen henkisiä edellytyksiä, niin atomiaseen varjossa kuin elämme. Propagandahan on rauhan työn ainoa ase. Täten siirrymme täysin epäpoliittiselle rintamalle. Mutta se on vain asialle eduksi, jos yksin siitä syystä, että politiikan voimana eivät ainakaan ole laajat näköalat ja kauas tulevaisuuteen tähtääminen.

Rauhan perusedellytykset demokraattisena aikakautena on kansojen yhteisymmärrys. Tämä merkitsee samanlaista ajattelutapaa inhimillisen elämän perusteista, ihmisoikeuksista ja kansalaisvelvollisuuksista. Se merkitsee sen tietoisuuden yleistymistä, että ihmisen jokapäiväiset tarpeet, hänen jokapäiväinen leipänsä ja henkinen ravintonsa, näennäisistä ja pinnallisista eroista huolimatta ovat samat. Lyhyesti: se merkitsee ihmisyyden tunnustamista.

Emme tahdo kieltää sitä, että yhteisymmärryksen aikaansaamiseksi on tehty paljon. Erinäisistä hajoittavista tekijöistä huolimatta koko kulttuurielämämme on yleisinhimillinen. Mutta kaikesta huolimatta emme voi kiertää sitä tosiasiaa, että yhteisymmärryksen ensimmäinen ehto edelleen puuttuu meiltä: yhteinen kieli.

Kehityksen suunta tosin on selvä. Näköalamme vain sumentaa se, että olemme kuulleet paljon puhuttavan kielten taipumuksesta hajautua murteiksi ja murteiden eri kieliksi. Ehkä meidän on helpompi nähdä, miten englantilaisten ja amerikkalaisten kieli pyrkii kehittymään eri linjoille, kuin havaita yleisesti vallitseva päinvastainen virtaus. Itse asiassa: kansanmurteet kulkevat tuhoansa kohti yhteiskielen saavuttaessa kussakin maassa yhä enemmän käyttöä ja valtaa. Ja suuret kulttuurikieliset voittavat yhä enemmän taitajia alkuperäisen leviämisalueensa ulkopuolelta. Tärkeintä on kuitenkin eri kulttuurikielten kehityksen yhteissuuntaus. Me olemme jo niin pitkän ajan kuluessa lainanneet yhteisistä lähteis-

tä ajatuksemme ilmaisun muotoja, että ainakin kaikkien eurooppalaisten kielten sanonta on pääpiirteissään samaa. **Ymmärtäminen** on meille kaikille »käsiin ottamista» (suomen 'käsiittää', ruotsin 'begripa', saksan 'begreifen', ranskan 'comprendre', latinan 'comprehendere' = ottaa yhteen), mainitaksemme vain yhden esimerkin tuhansista piilevistä, samoin kuin **radio** on kaikille kansoille radio. Suomen oikeakielisuysmiehet taistelevat osittain tätä pyrkimystä vastaan ja kenties hidastuttavat luonnollista kehitystä, mutta eivät voi sitä pysäyttää. Kaikki kulttuurikieliset kulkevat sisäistä samankaltaisuutta kohti, ja ovat jo sangen pitkällä tällä tiellä.

Mutta niin selvä kuin kehityksen sisäinen suunta onkin, ulkonaisesti se on hajanainen. Huomattava osa ihmiskuntaa pyrkii hankkimaan itselleen englanninkielen taitoa kansainvälisten suhteittensa ylläpidon aseksi. Yhtä valtava on niiden kansojen joukko, joille venäjän kieli on samassa asemassa. Espanjankieli on kahdenkymmenen kansakunnan oma kieli, ja silläkin on suuri tehtävä välityskielenä. Täältä katsoen ei ole helppo arvioida kiinankielen merkitystä tässä mielessä, mutta tiedämme kumminkin, että kymmenet miljoonat ihmiset, jotka eivät ymmärrä toistensa puhetta, kykenevät kiinalaisen kirjoituksen välityksellä vaihtamaan ajatuksiaan. Kielellinen keskittyminen kulkee siten maapallon eri alueilla ainakin neljää eri päämäärää kohti. Olemmeko tehneet itsellemme selväksi, että tämä asiantila, jos se on ainoa vallitseva, merkitsee paljon suurempaa vaaraa kuin atomiase — pitkällä tähtäimellä katsottuna? Se on omiansa pystyttämään valtavat rautaesiriput. Se saattaa jakaa ihmiskunnan neljään toisilleen vieraaseen ja vihamieliseen lohkokon, joista kukaan ei tahdo mitään tietää toistensa oikeutetuista vaatimuksista ja elämänehdosta.

Näiden rautaesirippujen syntymisen

# La Zamenhof-Jaro en Finnlando

**Preparaj laboroj** komenciĝis jam en 1958. Rezultoj:

Nova studplano en la lernejo de Somero: 6 semajnaj horoj de esperanto en la unua klaso kaj (efektivigita en sept. 1959) instruado de geografio per esperanto, okazanta en la klasoj 2—5.

Deklaracio de 12 eminentuloj por esperanto, el kiuj 10 aliĝis al la Internacia Patrona Komitato de la Z-jaro.

La Deklaracio publikigita en almenaŭ 30 ĵurnaloj kaj revuoj.

Pretigita nova lernolibro »Privilegia vojo» (Valtatie kielitaitoon), kiu aperis en januaro 1959 kaj ricevis ĉie aproban kaj laŭdan akcepton.

**Dum la jaro 1959** la lernolibro disvastiĝis en preskaŭ 2000 ekzempleroj en Finnlando; krom tio almenaŭ 1200 ekz. de la svedlingva variacio vendiĝis eksterlanden.

ESPERANTA FINNLANDO ekaperis presite kaj la abonantaro kreskis de 300 ĝis ĉ. 700.

La 4-a numero de EF kiel speciala Z-numero (»La baza dokumentaro») disvastigita en 5000 ekz. ekster la abonantaro, al eminentaj personoj tra la tuta lando.

En la gazetaro aperis minimume 240 artikoloj aŭ novaĵekstraktoj (245 finne kaj 5 svede) pri esperanto kaj Zamenhof. Detale studinte la kolektitajn eltranĉaĵojn (el kiuj verŝajne mankas kelkaj?), ni trovis, ke la nomo de Zamenhof aperis almenaŭ en 106 artikoloj. Cetere estis inter ili:

Generalaj artikoloj pri Esperanto	5
Artikoloj kaj novaĵoj pri Varsovio	58
Pri la lernolibro »Valtatie»	19
Pri Kalevala-traduko	19
La deklaracio	2
Zamenhof-festoj	31
Ekspozicioj	3
Sekelj	9
Ito	4
Collinder	7
Instruo kaj kluba agado	19
Koruso »Amikaro»	4
Jarlibro de UEA (recenzo)	1
Diversaj novaĵoj k.s.	34
Kulturaj artikoloj, kie Esperanto aperas en alia medio	11
Ilustraĵoj en la artikoloj	60

Ni intencis citi la ĵurnalojn, kiuj aperigis grandajn artikolojn, sed ĉar almenaŭ 40 ĵurnaloj aperigis artikolojn kun rubriko

vastustaminen on se kulttuurityö, johon voimme ryhtyä, ja johon meidän on ryhdyttävä, jos tahdomme luoda pysyvän rauhan henkiset edellytykset. Vilho Setälä

trans du kolonoj aŭ pli, ni devis rezigni pri tio, kaj nur diri, ke ĉiuj gravaj ĵurnaloj estas inter ili. — La revuoj estas: Elanto (koopera), Opettajain lehti kaj Oppikoulu-lehti (instruistaj), Kylväjä, Kajastus, Nuori Voima, Joka Poika, kaj Suomen Kuva-lehti. Kaj ĵus ni ricevis informon, ke »Bibliophilos» aperigis plenan liston de presajoj kaj libroj esperantaj (aŭ priesperantaj) aperintaj en Finnlando aŭ verkitajn de finnoj.

Publikaj Zamenhof-festoj okazis almenaŭ en Turku, Helsinki, Vaasa, Jyväskylä, Tampere kaj Laihia, kaj en ĉiuj kluboj oni dediĉis ian programon aŭ priparolon al Z dum la ordinaraj kunvenoj.

La vizitoj de Tibor Sekelj (Somero, Hämeenlinna, Helsinki, Turku), Eizō Ito (Jyväskylä, Somero, Hämeenlinna, Helsinki, Turku) kaj Björn Collinder (Helsinki kaj Jyväskylä) estis gravaj, precipe: Sekelj kiel gasto de la universitata Geografia Societo en Helsinki, Collinder kiel gasto de Suom. Ugril. Seura (Finna-ugria Soc.), Kalevala-societo kaj la esp. organizaĵoj en Helsinki, kaj kiel gasto de la Pedagogia altlernejo en Jyväskylä.

Gravaj ekspozicioj estis en Tampere kaj Helsinki.

Miksita koruso Amikaro prezentis koncerton en Tampere, Rauma kaj Turku (kaj Kokemäki?).

Fondiĝis 11 studrondoj (kiuj ricevas ŝtatan subvencion), eble pli. La nombro de registritaj membroj en ili estas 74.

Geneologia societo Suontausta presigis kovertojn kun esperanta devizo.

Instruado okazis, krom en menciita lernejo de Somero, en popollernejoj de Pori, Tampere, Turku-Rauvola, Hamina, Juupajoki, Jyväskylä, Simo, Sotkamo, Vammala.

En Laboristaj kaj Civitanaj institutoj oni instruas E:n en Mikkeli, Turku, Helsinki, Tampere, Rauma, Kuopio, Lahti, Vääksy, Kokemäki, Lauritsala—Lappeenranta.

Prelegoj de mag. Setälä okazis en Helsinki, Pori, Kokemäki, Tampere, Kuopio, Rauma, Lappeenranta, Taipalsaari.

## ĈU OKAZIS IO MALFAVORA AL ESPERANTO?

En la gazetoj (ni vidis nur en unu) aperis novaĵo pri la latinista kongreso en Lyon, kie »esperanto estis malbela vorto». Sed tion plene neŭtraligas la artikoloj, en kiuj oni menciis esperanton tute nature en alia kunteksto (la biblioteko de Eino Leino, la islanda verkisto Torbergur Tordarson kaj 9 aliaj).

En unu ĵurnalo de Tampere aperis (2) kozerioj de pseŭdonimo »Vanha Kamreeri»

kontraŭ esperanto. Sed tio ne gravas: li estas jam de longe konata, cetere lerta kaj sprita kozeriisto, kiu fariĝas preskaŭ histeria tuj kiam estas parolo pri internacia lingvo. Eble pro tio, ke li mem estas bona tradukisto kaj scias la malfacilaĵojn de tradukado el nacia lingvo en alian, kaj ne kredas pri la eblecoj de esperanto. Li eĉ pretendas, ke li pensis lerni nian lingvon, sed ne sukcesis en tio. Tamen, esperanto ne estas la sola afero, kiu ekscitas lin: same li koleras kontraŭ abstinuloj kaj — la poŝta ĝirokonto! Do, ni lasu lin en paco!

### LA VOĈO DE AMERIKO DISSENDOS RADIO-PROGRAMOJN EN ESPERANTO

La Voĉo de Ameriko, la tutmonda radio-servo de la usona registaro, decidis dissendi eksperimentan serion da programoj en Esperanto, komencante la **11-an de Marto 1960**. Oni preparas 6 programojn 30-minutajn kun tre varia enhavo: intervjuoj, diskutrondoj, raportoj pri kulturo, literaturo, ekonomio, scienco, tekniko kaj la eksterlanda politiko de Usono, novaĵoj el la Esperantomovado, »Demandoj kaj Respondoj pri Ameriko». La programojn direktas D-ro William Solzbacher, Membro de la Akademio de Esperanto, en kunlaboro kun fakuloj kaj eminentuloj usonaj kaj eksterlandaj.

En 6 sinsekvaj semajnoj ĉiu programo estos dissendata **trifoje ĉium vendredon**, je 11.00, 12:00 kaj 22.00 h. laŭ la horsistemo de Greenwich. La tria sendo, je la 24a horo en Finnlando, sur la ondlongoj de 31.28 m (9590 kcs) kaj 30.74 m (9760 kcs), devus esti bone aŭdebla en Eŭropo kaj la apudaj regionoj de Azio kaj Afriko. La programoj estos aŭdeblaj ankaŭ en aliaj partoj de la mondo.

La Voĉo de Ameriko decidis laŭ la spertoj kaj rezultoj de la eksperimenta serio pri eventuala regula uzo de Esperanto. Raportoj pri la ricevo de la programoj, rimarkoj pri la enhavo kaj demandoj respondataj en la rubriko »Demandoj kaj Respondoj pri Ameriko» estu adresataj al D-ro W. Solzbacher, Voice of America, Rm. 2528 HEW, Washington 25, D.C., Usono. Sendinto de demando por »Demandoj kaj Respondoj pri Ameriko» laŭeble ricevos antaŭan informon pri la tago, kiam la respondo estos donata antaŭ la mikrofono.

### ANONCETOJ

**ESPERANTOKURSO** laŭ »Linguaphone»-sistemo (15 diskoj + gvidlibro), preskaŭ nova, forvendata favorpreze. Detaloj ĉe subskribinto.

**ESPERANTOKURSSI** »Linguaphone»-järjestelmä (15 äänilevyä + ohjekirjanen), melkein uusi, myytävänä edullisesti. Lähemmin allekirjoittaneelta.

S-ino Saimi Uranen, Kulmakatu 10. A. 2, Helsinki. Puh. 30301.

### JUBILEOJ

**Vilho Väisälä**, profesoro, eksdirektoro de la aerologia sekcio de la meteorologia instituto de Finnlando, fariĝis 70-jara jam la 28an de septembro pasinta, kaj ni devas peti pardonon, ke ni nur nun gratulas lin. Li estas unu el la tri esperantistaj fratoj Väisälä — la du aliaj estas Yrjö, kaj Kalle, la matematikisto. Ilia patro, kontoristo Johannes Veisell, estis eble la sola volapukisto en Finnlando — en 1888 aŭ -89 li publikigis finnan gramatikon de Volpük en Joensuu. Li havis vastan korespondon per tiu lingvo kaj per tio fariĝis la unua filatelisto en Finnlando. Jam antaŭ la publikigo de sia gramatiko sro Veisell konatiĝis kun esperanto kaj evidente konvinkiĝis pri ĝia supereco, sed sub la influo de Stokholma volapuka societo li tamen restis ĉe volapuko. En lia familio la ideo de internacia lingvo forte radikigis kaj fine ekfloris per la esperantistigo de la tri talentaj filoj. — Vilho, kiu nun jubileas, estas internacie konata almenaŭ per sia radiosondilo, aparato, kiun oni sendas per balono en la atmosferon, kaj kiu aŭtomate per sia sendilo donas informojn pri la temperaturo, sekeco kaj atmosfera premo al la observa stacio; krom tio oni ricevas per ĝia helpo informon pri la direkto kaj rapido de la vento. La sondilo estas malpeza — 280 g — kaj povas, portate de balono pezanta nur 300—350 g, atingi altecon de pli ol 20 km. (La sondilo konstruitaj en aliaj landoj pezas ĉiuj pli ol 600 g, la usona, angla kaj rusa inter 1000—1200 g). La sondilo de Väisälä estas uzata en ĉiuj skandinavaj landoj kaj en Belgio, krom tio en multaj landoj arikaj, aziaj kaj latinamerikaj. Ĝia favoro dependas ankaŭ de tio, ke ĝi estas facile manipulebla ankaŭ de nefakulo kaj donas tute aŭtomate la informojn sur papero.

**Hugo Salokannel**, eks-staciestro, fariĝis 80-jara la 19an de januaro. Li fariĝis esperantisto en 1904 kaj post tio fidele kaj konstante laboris por nia idealo. Li fondis la Fervojan Esperantosocieton de Finnlando, dum 10 jaroj servis kiel prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando, estis kunredaktoro de Kristana Espero dum kelkaj jaroj. Li faris sennombrajn paroladojn pri esperanto kaj publikigis 89 librojn, libretojn kaj flugfoliojn pri, por kaj en esperanto, el kiuj eble la plej rimarkinda estas »Grava popolhigiena kaj socia demando» (Vaasa 1926). — Krom esperantisto, samideano Salokannel partoprenis entuziasme en la abstineca, bestprotekta, kontraŭtabaka, kristans k.a. movadoj kaj agadis kiel agento de la Finnlanda Turisma Societo. Ankaŭ pri tiuj li verkis ĉ. 40 libretojn kaj flugfoliojn. Samtempe kiam ni gratulas samideanon Salokannel ni publikigas sur alia paĝo »kiel li fariĝis esperantisto».



**Sro Joel Vilkki** sendis al ni »Instruan rakonteton», en kiu li atentigas, ke okazis en la 34a UK en Bournemouth eraro, pro tio ke radiooficisto miskomprenis la angian vorton »finnish» por »finished» ('finno/'finita'). Ĉar temas pri angla lingvo, kaj ni ne povat iel influ la nomon de Finnlando en tiu lingvo, ni ne presigas la rakonteton. Sed jen sekvas alia artikolo subskribita de li kun sinjoro **Tietti**.

La raporto en la oktobra numero donis la impreson, ke ni deziras por la gazeto novan unuflankan nomon. Fakte ni nur malaprobis la malnovan unuflankan nomon kaj deziras duflankan nomon »Esperanta Finnlando — Esperanta Suomio».

Ni konstatas, ke Zamenhof celkonscie evitis enpreni en sian lingvon radikon kun duobla konsonanto; en centoj da vortoj li tiurilate sangis la nacilingvan modelon. Lia penado iĝas vana, se ni la duoblan konsonanton toleras en iu vorto, kiu post la morto de Zamenhof transiris de la faka en la ĝeneralan lingvon.

Tial ni kun ĝojo akceptis la novan radikon »suom-», kiun francoj kaj aliaj eksterlandanoj jam multe uzas. Sed ni scias, ke ĉi-tiu radikoj ne harmonias kun la sufikso »-ujo». Ĝi postulas la sufikson »-io», kiu ne estas oficiala, sed pro sia belsoneco kaj flueco plu kaj plu disvastiĝas.

Kiel en aliaj landoj tiel ankaŭ ĉe ni ekzistas rifuzantoj kaj uzantoj de la sufikso »-io». Ĉe ni la uzantoj de la nova sufikso povas kaj ŝatas uzi ankaŭ la novan radikon. Tiel devas ekzisti paralele la du vortoj »Finnlando» kaj »Suomio» tiom longe, kiom estas nesolvita la disputo pri la sufikso »-io».

Hemmo Tietti kaj Joel Vilkki

**Sro Paŭlo Balkányi** skribas en longa letero i.a.: Ĉiu popolo havas la rajton mem decidi, kiel oni nomu en la internacia lingvo sian genton, sian landon. Sed tamen estas konsiderendaj ankaŭ la internaciaj kutimoj. ... En la mondo la finnoj estas tiel konataj, tiel nomataj, tiel ŝatataj. La nomon Suomi oni konas ĉefe el la poŝtmarkoj kaj la ĉemizoj de finnaj sportistoj. Tio ne estas sufiĉa argumento...

**Inĝeniero L. Seckeres el Novi Sad** ankaŭ lasas la temon Finnlando/Suomio al ni. Sed li deziras forigi la vorton »Esperanta» kontraŭ »Internacia lingvo». Sed ĉefe li pledas pri tio, ke fakaj revuoj havu fakan kaj ne esperantan titolon. La nia tamen estas precize »organo de nialanda Esperanto-movado», kaj meritas havi nomon laŭ tio.

La Redakcio ne volas ripeti sian vidpunkton, sed aludas al la notoj en nia

numero 7 (p. 55—56) kaj 8 (p. 62). Kaj por fini la polemikon ni donas parolvicon al **L. L. Zamenhof** (al kiu oni jam antaŭe aludis) repesante kelkajn frazojn el lia Alvoko al la Diplomatoj (de 1915):

»Ĉiu lando morale kaj materiale plene egalrajte apartenas al ĉiuj siaj filoj.

Se vi eĉ farus nenion alian, se vi nur forigus la gentajn nomojn de la landoj, vi jam farus per tio agon eksterordinare gravan, vi kreus novan eron en la historio de Eŭropo. Ĉar en lando kun neŭtrala nomo la tuta natura plena egalrajteco de ĉiuj ĝiaj loĝantoj pli aŭ malpli frue nepre estos atingita, sed en lando kun nomo genta la egalrajteco neniam estos plena kaj daŭra... Resumante ĉion, kion mi diris, mi ripetas: ... 4e) Ĉiu regno kaj ĉiu provinco devas porti ne la nomon de ia gento, sed nur nomon neŭtralegeografian...»

La Redakcio kuraĝas opinii, ke la proponita nomŝanĝo almenaŭ ne harmonias kun tiu opinio.

## GRAJNOJ EN VENTO

Grajnoj en Venton toistaiseksi ainoana suomalaisena asiamiehenä on Suomen Opettajain Esperantoliitto, os. Tampere, Pispalanharju 13.

Pyydämme, että albumista kiinnostuneet kerhot ottaisivat meihin yhteyden. Lainaamme luettavaksenne ja katseltavaksenne albumeja. Tosin meillä on niitä vasta kaksi, mutta talven kuluessa ne ennättävät kiertää monien kerhojen katseltavina.

Seuraava Grajnoj en Vento-albumi ilmestyy maaliskuun 1. p:nä. Sen luettuamme kerhoissamme on sekin valmis kierto-matkalle.

Lähetämme Tampereelta Pispan kansakoulun tyttöjen ja poikien kirjoituksia ja piirroksia Grajnoj en Venton kokoamispaikkaan, Ranskaan. Olisi toivottavaa, että varttuneimmatkin suomalaiset olisivat kirjoituksillaan ja piirroksillaan edustettuina tässä koko maailman käsittävässä julkaisussa.

Jos innostutte asiaan, niin lähettäkää helmikuun 10 p:ään mennessä aineisto meille. Monistamme sen ja lähetämme edelleen.

Esperantokerhot, joissa on alle 20-vuotiaita kerholaisia, tulkaa mukaan yhteistyöhön.

N. Tumi.

## VAIN 300 MARKKAA!

Uusi vuosi merkitsee tärkeätä tehtävää. Uudistakaa tilauksenne nyt. Siten takaatte lehden jatkuvan tulon teille.

ESPERANTA FINNLANDO

## ANEKDOTO

Tio okazis foje en Anglujo dum la milito. Viro estis konskriptita en la armeon, sed evidentigis, ke li nur scipovas paroli dialekton de la skota kelta lingvo. Tute vane la oficiroj kaj sub-oficiroj de la unuo ordonis lin, kriis kontraŭ li kaj minacis lin. Li ne komprenis. Kaj finfine oni devis ellasi lin el la armeo por ke li iru hejmen.

Oni rakontas, ke ĝuste kiam li eniris la trajnon, li diris per perfekta angla lingvo al la suboficiro, kiu estis akompaninta lin al la stacidomo: »Dankon serĝento. Nun ĉio estas en ordo.» Sed tion mi ne kredas.

### IFEF:n 12. ESPERANTOKONGRESSE HELSINGISSÄ 11—16. 6. 1960.

Ne Helsingissä tai lähiympäristössä asuvat, jotka aikovat lähivuosina matkustaa kansandemokraattisiin maihin ja jotka haluavat huoltaa jugoslaviaalaisia, bulgariaalaisia, unkarilaisia, tshekkoslovakialaisia, itäsaksalaisia y.m. tänne saapuvia kongressivieraita vastavuoroisuutta noudattaen, kehoitetaan ottamaan pikainen yhteys paikalliseen kongressikomiteaan osoitteella Helsinginkatu 6. B. 50 tai puhelimella 775143 mieluummin ennen klo 9 aamuisin, ennen helmikuun loppua.



### VIIME HETKESSÄ

Kouluhallitus on hyväksynyt kirjan VALTATIE KIELITAITOON käytettäväksi esperanton oppikirjana suomenkielisissä oppikouluissa.

Alankomaissa on meneillä parlamentille osoitettava anomus esperanton ottamisesta oppiaineeksi kouluihin. Joulukuun loppuun mennessä oli allekirjoittajia 773'579!

Kokemäen yhteiskoulun teinikuntaan on perustettu esperantokerho.

### EN LA LASTA MOMENTO:

La lernolibro PRIVILEGIA VOJO AL LINGVOSCIO estas oficiale aprobata por uzo kiel lernolibro de esperanto en finnaj lernejoj (mezajj).

Esperanta klubo estas fondita en la lernejo de KOKEMÄKI, inter la lernantoj de la liceaj klasoj. Prezidanto Ilkka Kuisma, sekretariino Terttu Männistö, kuratoro lektoro Erkki Soini. Adreso: Yhteiskoulu, KOKEMÄKI.

## Eino Leino

### KANTO ĈE TOMBO

Rulas senripoze rivero fluanta,  
maro sola granda, vi, maro belbluanta.  
Dormu, ondo sino de l' maro.  
Vento blovegas, folio forflugas,  
homo en valo en humon ĝin plugas.  
Dormu en la valo feliĉa.  
Nevidebligas steleton mateno,  
ne eterne tenas mortinton mortkateno.  
Dormu, stelo, sine de l' tago.

El la finna P. Riihivara.

### KIEL, KIAL KAJ KIAM MI FARIĜIS ESPERANTISTO

Tio okazis en marto en la jaro 1904. Mi tiam estis viclegrafisto en la stacio Selänpää. Mi kutimis tagmanĝi ĉe komercisto kontraŭ la fervoja stacio. Tie mi hazarde trovis broŝureton de Süßmuth, kiu enhavis nur kelkajn ekzercojn de la zamenhofa gramatiko. La edzino kaj la komercisto decidis tuj eklerni tiun mirindan lingvon, kiu laŭ informo jam estis dua oficiala lingvo en la franca urbo Dijon. Kiam ni promenos sur la perono de la stacio, neniu en Selänpää komprenos, kiun lingvon ni parolas! Do: demando pri eta ambicio. Poste mi legis en Uusi Suometar kaj poste en Nya Pressen novajeton pri Esperanto, kaj tio min ankoraŭ pli entuziasmigis kaj konvinkis pri la utileco graveco kultura, ekonomia kaj religia de la internacia lingvo.

La ĉiama portado de esperanta steleto estas bona propagando. Iun matenon en deĵoro mi renkontis unuan samideanon, inĝenieron Sulo Attila, kiu rimarkis mian steleton kaj kore salutis dirante, ke ankaŭ li eklernis Esperanton. Por esti certa pri la prononco de kelkaj literoj inĝ. A. veturis al Helsinko, kaj en 1906 li jam partoprenis en la dua UK en Genevo kiel reprezentanto de la Klubo Esperantista de Karhula, kiun ni kune fondis. Komence ni kune aranĝis ekzercojn en Karhula, kaj mi en Kymi. Mi fondis klubon en Korkeakoski, proksime al mia loĝejo en Kymi, kaj la afero progresis tiel bone, ke ni baldaŭ havis 100 gelernantojn en tiuj lokoj. Kiel lernolibron ni uzis »Kurso Tutmonda» de E. Gasse, natura metodo sen vortaro. Pli poste estis uzata la finna eldono de la Fundamento de Zamenhof («Kielioffi ja harjoituskirja»), eldonita de Gummerus en Jyväskylä.

Tia estis la starto de mia modesta esperantistigo en 1904.

H. Salokannel.

